2.ª Ep. AÑO VI N.º 34 (170) NOVIEMBRE - DICIEMBRE 1968

Boletin

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

ĜOJAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVAN JARON !!!



Sub la signo de la ESPERO
neĝo degeliĝas kaj nova vivo floras

BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Str. Torre Nueva, 30, 1.° ZARAGOZA
Redacción y Administración:
Secretaría: Marina Moreno, 35, 4.° Dcha.
Director: Domingo Martínez Benavente

ADRESOJ

Hispana Esperanto Federacio
Prezidanto:
Dro. Miguel Sancho Izquierdo
Str. Torre Nueva, 30, 1.°
ZARAGOZA

Ĝenerala korespondado:
Sekretariino:
Inés Gastón
P.° Marina Moreno, 35, 4.° Dcha.
ZARAGOZA

Monsendoj:
Kasistino:
María Pilar Gómez
Str. Bolonia, 14, 1.°
ZARAGOZA

Sendaĵojn pri statistiko kaj informado al:
S-ro. Salvador Aragay
Str. Arce, 8
CORNELLÁ (Barcelona) Hispanio

Libroservo:
Sekretariejo de H. E. F.
P.° Marina Moreno, 35, 4.° dcha.

Ĉekkonto: n.° 14114, Banco de Bilbao
ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 120 ptojn.

De Secretaría

En la Junta General, a propuesta de algunos federados se trató de la subida de cotizaciones, quedando sin tomar acuerdo en firme ya que al no formar parte del orden del día, no estaba previsto y por lo tanto estudiado el asunto, que quedó a resolver por la Junta Directiva.

La Junta Directiva ha decidido no fijar subida de cotización para el año 1969. Así, pues, la cotización queda como hasta ahora, voluntaria, únicamente se ha decidido no enviar reembolsos por cotización menor de 100 pesetas, por lo tanto, todo aquel que cotizando cantidad inferior a ésta desee conservarla, deberá satisfacerla antes del día 1.° de marzo, de lo contrario se considerará que voluntariamente ha aceptado esa subida.

Las cotizaciones para los Congresos Nacionales son las que han sufrido variación en alza como verán en los *aliĝiloj* que se repartirán con el próximo número de BOLETIN.

A petición del Grupo Esperantista de Tenerife ha sido variada la acostumbrada fecha para la celebración del Congreso este año, habiéndose solicitado el oportuno permiso para celebrarlo del 5 al 10 de julio de 1969.

Los originales enviados para BOLETIN, si han de ser publicados, deben de enviarse escritos a máquina y a doble espacio, para poder ser entregados en la imprenta.


Con arreglo al art. 24 de la vigente Ley de Prensa e Imprenta, ponemos en conocimiento de nuestros lectores que los señores que constituyen los órganos rectores de la revista, Boletín de la Federación Española de Esperanto, son los siguientes:

Director: Don Domingo Martínez Benavente.

Redacción: Doña Inés Gastón Burillo, Secretaria de la Federación Española de Esperanto.

La revista está financiada por la Federación Española de Esperanto, cuyas cuentas fueron presentadas por la Tesorera de la misma, doña María Pilar Gómez Hernández, a su debido tiempo y publicadas en el número de la revista correspondiente a los meses de marzo-abril.

D. Ramón Menéndez Pidal



Cuando se preparaba el 53 Congreso Universal de Esperanto que este mismo año se celebró en Madrid, rogamos a don Ramón Menéndez Pidal, quien poco antes había cumplido los 99 años, nos permitiera incluir su nombre en el Comité de Honor de dicho Congreso. Nos llevaba a hacerle esta petición, no sólo el hecho de ocupar él la Presidencia de la Real Academia de la Lengua, sino también su conocida inquietud y consiguiente afán, apenas frenado por los años, por cuanto a la filología se refiere, y base filológica —aun trascendiendo esta base la "*interna ideo*" del Esperanto— tenía el Congreso que ibamos a celebrar.

Con el espíritu abierto característico del que bien podíamos calificar de patriarca de las letras españolas, nos contestó don Ramón aceptando nuestra invitación en carta que guardamos como una reliquia.

Hoy el roble —en frase de Gil Comín en "El Noticiero"— ha sido abatido. Aquellas palabras de don Ramón a Luis María Ansón, citadas en el mencionado artículo, en las que le decía no desear a nadie que cumpla su centenario, parecen haber hallado eco en la divina providencia que dispuso no lo cumpliera él.

La Federación Española de Esperanto, abierta también al reconocimiento de cuantos valores espirituales son y han sido y especialmente ligada por deberes de gratitud con don Ramón Menéndez Pidal, al asociarse al duelo que su muerte ha producido en todos los medios, quiere dejar aquí especial constancia de ese reconocimiento y esa gratitud.

M. SANCHO IZQUIERDO
PRESIDENTE



16-23 FEBRUARO 1969

Kvankam vi ĉiuj, tutcerte jam estas informitaj pri Semajno de Internacia Amikeco, nun, kiam jam estas decidita la dato por ĝin okazigi, ni deziras pli konkrete informi vin pere de BOLETIN.

La okazigo de Semajno de Internacia Amikeco estis ideo de S-ro Carlen; do, nenio estas pli oportuna por vin informi ol artikolo de li verkita kaj sendita al La Espero (La Sveda Esperanto-gazeto). Sed, tial ke ĉiu lando, eĉ ĉiu urbo havas malsamajn eblecojn, mi nur transskribos la ĉefajn punktojn:

«En februaro 1969 ni la unuan fojon festos Semajnon de Internacia Amikeco. Revuo Esperanto jam havis artikolon pri ĝi kaj aliaj venos en la sama revuo.

La celo de la Semajno estas:

Fari la ideon pri amikeco trans limoj naciaj, rasaj, lingvaj, politikaj kaj religiaj vivanta inter ĉiuj homoj. Tio signifas ke ni disvastigos kaj vivantigos la «internan ideon» de Esperanto en nova maniero kaj en granda medio. Samtempe ni faros Esperanton konata, kvankam ni ne rekte propagandas ĝin. Ni ankaŭ volas krei belan tradicion inter la esperantistoj mem.

Por realigi tion ni petas ĉiun lokan grupon aŭ societon esperantistan en la tuta mondo aranĝu festan kunvenon por siaj membroj jam la 15-an de februaro en la vespero.»

Sekvas proponita programo kiun mi ne transskribas ĉar kiel mi diras je la komenco ne nur ĉiu lando, ĉiu urbo havas malsamajn eblecojn kaj morojn, do, la gvidantoj de ĉiu grupo devas organizi la programojn laŭ iliaj eblecoj.

Dum la semajno vi devas sendi salutkartojn kaj eĉ donacojn al viaj geamikoj, por tiu interŝanĝo de salutoj la Federacio jam pretigis por vi kartojn kun la emblemo de la Semajno.

Por disvastigi la ideon de la Semajno de Internacia Amikeco ni pretigis ankaŭ kun la emblemo de la Semajno, afiŝetojn por proponi al la vendistoj ke aperigu ilin en iliaj butikoj. Sur la afiŝeto, krom la emblemo devos aperi iu frazo pri la amikeco, en nacia lingvo. Tiujn afiŝetojn ni dissendos dum la monato januaro.

Vi ne devas forgesi ke la Semajno de Internacia Amikeco ne estas nur por esperantistoj, dum ĝi vi devos interŝanĝi salutojn, ktp. ankaŭ kun ne esperantistoj, tial estus konvene organizi la semajnon kune kun alia organizaĵo. Sed por propagandi Esperanton estas konvene uzi la kartojn eldonitajn kun la emblemo de la Semajno kiu krom la stelo havas frazon en Esperanto. La salutkartoj estos dulingvaj.

Se vi bezonos plurajn informojn, helpon aŭ konsilojn, skribu al la Sekretariejo de H.E.F., ni volonte helpos vin.

Poŝtkartoj: prezo dek ptoj deko.


LASTMOMENTA SCIIGO !!!!

Ĵus ni ricevis la Verdikton de Konkurso, premio «COMELLA-BASSOLS» kaj ĝoje ni konstatis ke la Unuan Premion meritis la konkursaĵo NIGRULA BLANKULO, verkita de nia kara kolego kaj amiko, estrarano de H.E.F., S-ro Giordano Moya Escayola.

Por ni, ne estas miriga la fakto ke S-ro Moya estu atinginta la Unuan Premion, tial ke ni bone konas liajn meritojn, sed ni tre ĝojas ke liaj meritoj estis rekonitaj internacie.

Nian plej koran gratulon al S-ro Giordano Moya Escayola.

LA INFANAJ KUNVENOJ



Jen kelkaj el la geknaboj. Reprezentataj landoj: Hispanujo, Portugalujo, Italujo, Germanujo kaj Norvegujo.

Kiel ni, ĝustatempe, informis en BOLETIN, Pontevedra-a H.E.F.-ano S-ro Antonio Alonso Núñez, en interkonsento kun la Ĉefinspektoro kaj Inspektoroj de la provinco Pontevedra, ekinstruis Esperanton al samurba unuagrada nacia instruisto S-ro Manuel Pichel González, kaj samtempe organizis Esperanto-kurson por knaboj 9-11 jaraĝaj, gvidatan de S-ro Pichel, la celo estis prezenti ĉe la Infana Kongreseto en Madrid kvar el tiuj knaboj post tri-monata kurso kaj kontroli la atingitajn rezultojn.

Pro ne sufiĉa nombro da aliĝintoj, la Infana Kongreseto ne okazis, sed S-ro Alonso decidis preni sur sin la respondecon ĉeesti la 53-an Kongreson kune kun (krom lia familio), la instruisto-kunlaboranto kaj kvar knaboj kiuj finis la kurson. Ĉefa kialo de tiu decido estis ne seniluziigi la knabojn kaj kontroli la rezultojn.

Tial Ges-roj Alonso Núñez tuj klopodis kunigi la geknabojn kongresantajn: entute, 24 kun ok malsamaj naciaj lingvoj (portugaloj, francoj, italoj, jugoslavoj, germanoj, norvegoj, usonanoj, kaj hispanoj). Kvankam la partopreno ne estis konstanta, oni sukcesis kunigi ĉiutage, areton da plurnaciaj geknaboj, kiuj dum tri-kvar horoj kune kantis, ludis, promenis, vizitis ĝardenojn kaj Zoologian parkon, lernis lecionojn, kaj interbabilis pri la respektivaj preferoj, aĝoj, landoj, ktp. Rimarkinda fakto kiun gesinjoroj Alonso Núñez tie ĉi publike dankas, estas ke pluraj kongresanoj volonte helpis.

La ĉefa rezulto de tiuj kunvenoj estas certigita per skribaĵo subskribita de S-roj Pompilio kaj D-ro Régulo Pérez (KKS kaj Katedra Prof. en La Laguna), kie ili asertas ke niaj kvar knaboj parolas Esperanton pli flue ol ilia instruisto S-ro Pichel, kaj ke ili povus solvi per Esperanto siajn plej urĝajn problemojn (horaroj, manĝoj, vojaĝoj, malsanoj, ktp.).

Surbaze de tia atesto informo estas nun redaktata pri rezultoj, bezonataj tempo kaj kosto (la instruisto ricevis entute dek-kvin horojn da instruado, la lernantoj sepdek kvin, la libroj kostis kvindek pesetojn, ktp.). Oni esperas ke tiu informo povos esti akceptita de la Ministerio.

Fine, malgranda anekdoto, S-ro Alonso Núñez estis la venkinto en la konkurso kiun oni prezentis en la finna giĉeto dum la Universala Kongreso; estis tre oportuna hazardo ke li trafis la ĝustan nombron: la botelo enhavis ĝuste 133 bombonojn, kiuj preskaŭ ne sufiĉis por la avidaj buŝetoj de la kolektiĝintaj geknaboj!!! Gesinjoroj Alonso kelkfoje rigardas la belan artan botelon, sola restaĵo de tiu premio por ili, kaj ne scias ĉu bedaŭri aŭ ne ke ĝi ne estas ankaŭ manĝebla, kaj tiel bongusta kiel la bombonoj estis... laŭ aserto de la geinfanoj.

INAŬGUROJ DUM T.E.J.O. - KONGRESO



En Tarragona estis inaŭgurita strato Dr. L. L. Zamenhof.




La urbestro de Monistrol de Montserrat kun la Prezidanto de H. E. F. kaj gekongresanoj dum la inaŭguro de strato Dr. L. L. Zamenhof. Dekstre Infana Folklora Grupeto.



La Prezidanto de H. E. F. D-ro. Miguel Sancho Izquierdo, rompas botelon de ĉampano Verda Stelo kontraŭ la muro de "HEJS Junulara Restadejo HEF" antaŭ malfermi la pordon por inaŭguri ĝin.



La gekongresanoj gaje festas la inaŭguron.



SINFONIA ORKESTRO DE LA RADIO KAJ TELEVIDO HISPANA

La Sinfonia Orkestro de la RTV Hispana estis kreita por respondi al la bezonoj kiujn aperigis la ĉeesto de du cirkonstancoj absolute novaj: la naskiĝo kaj splendora disvolviĝo de la Nacia Televido kaj la supermezura kreskado de la «Hispanaj Festivaloj». Se la normala irado de la Radio postulis taŭgan ilon por la muzika disvastigo, la sumo de Radio, Televido kaj «Hispanaj Festivaloj» postulis ĝin plej urĝe kaj definitive.

La oficiala prezentado de la Orkestro okazis la 27-an de majo 1965 en la Zarzuela Teatro de Madrid okaze de la II-a Opera Festivalo, kaj tuj poste en la Granda Licea Teatro de Barcelona. De tiam ĝi trakuris la tutan Hispanujon renovigante sian komencan sukceson kaj atingante laŭlonge de multnombraj koncertoj maturiĝon unuanime rekonita. Ĝiaj semajnaj vesperfestoj por la «Koncertklubo de la Hispanaj Festivaloj» kaj ĝia aktiva partopreno en la Nacia Festivalplanado, el kiu ĝi estas baza piliero, donis al ĝi prestiĝon tiel grandan kiel ĝia populareco.

Jen la Orkestro dum la Eksterordinara Koncerto de Hispana Muziko (CCXVIII-a Koncerto) dediĉita al partoprenantoj de la 53-a Universala Kongreso de Esperanto en Madrid.

PREMIO "COMELLA - BASSOLS" 10.ª Konkurso

VERDIKTO

La Juĝanta Komisiono havas la honoron deklari ke, pro favora ĝenerala voĉdonado, la plej alta nombro da poentoj atingitaj de la konkursaĵo NIGRULA BLANKULO, verkita de Giordá Moya Escayola, el Tarrasa (Hispanio) meritis la Unuan Premion.

La Dua Premio estas gajnita de la rakonto ETA KOMPLEZO, verkita de Tibor Sekelj, el Jugoslavio.

Sincere ni gratulas la premiitajn aŭtorojn kaj kore dankas ĉiujn partoprenintojn al nia Konkurso.

Amalia Núñez Dubús, N. H. C. Macpherson, Gabriel Mora i Arana kaj Francesc Vilá, Sekretario.

STATISTIKAĴOJ

Nuntempe multaj personoj ŝatas la statistikajn resumojn, ĝiajn zigzagajn liniojn, la el ili eltiritajn konkludojn...

Mi ĉi tie alportos nur simplajn ciferojn. Vi mem povos desegni la liniojn kaj eltiri la konkludojn.

I. — Nombro da aliĝintoj al la 53-a Universala Kongreso laŭ landoj.

Jugoslavujo	373	Svisujo	16
Hispanujo	326	Aŭstrujo	12
Francujo	219	Grekujo	10
Britujo	94	Israelo	7
Italujo	94	Aŭstralio	6
Bulgarujo	68	Brazilo	5
Germanujo	57	Kanado	5
Nederlando	55	Monako	4
Svedujo	54	Nov-Zelando	3
Usono	43	Hongkongo	2
Belgujo	36	Koreo	2
Hungarujo	30	Islando	2
Danlando	25	Meksikio	2
Ĉekoslovakujo ...	22	Sovetunio	2
Pollando	29	Argentino	1
Finnlando	27	Tunizio	1
Portugalujo	22	Arabujo	1
Japanujo	20	Urugvajo	1
Norvegujo	20		
		Entute	1.696

II. — Nombro da hispanaj aliĝintoj laŭ provincoj

Barcelona	96	Lugo	2
Madrid	53	Málaga	7
Zaragoza	46	Asturias	8
Valencia	27	Valladolid	6
Vizcaya	25	Santander	5
Tenerife	11	Salamnca	2
Sevilla	4	Tarragona	2
Castellón	3	Ceuta	1
Mallorca (Palma)	3	Gerona	1
Jaén	2	Huesca	1
Lérida	2	Palencia	1
Pontevedra	9	Guipúzcoa	1
Alicante	8		
		Entute	326

III. — Nombro da hispanaj aliĝintoj laŭ regionoj

Kataluno	101	Andalucio	13
Nov-Kastiljo	53	Malnov-Kastiljo ...	5
Aragono	47	Baleara Insularo ..	3
Valencio	38	Leon	9
Kanaria Insularo .	11	Ceuta	1
Galico	11	Ekstremaduro	0
Vaskujo	26	Navaro	0
Murcio	0		
Asturio	8	*Entute*	326

En la Kongresa libro kaj ĝia suplemento:

Forestas la nombroj 450, 451, 629, 1.499 kaj 1.517, duobliĝas la nombro 1.582 (sama persono), pro komposterareto la ripetita 1.117 anstataŭas la 1.118.

NOMBREMULO

Ne apartenas al fantazia mondo de legendo aŭ fabelo la ĉefaj faktoj de ĉi tiu rakonto. Ili estas vera okazintaĵo, kiu, dum la kristnaska nokto de la jaro 1351-a, tute neatendite, kaj absurde, realiĝis sange kaj tragike, ĉar la abato Biure, el la monaĥejo de Sant Cugat del Vallés, apud Barcelona, estis murdita dum solena celebrado de la matutino.

La nobela familio Saltells, kies tombo ankoraŭ nuntempe troviĝas ĉe la muroj de la menciita monaĥejo, havis, ho bedaŭro!, diboĉeman filon nomatan Berenguer. Same kiel la evangelia «prodiginta filo» (Lk XV, 11), li forlasis la patrohejmon. Sed, tiuokaze, liaj gepatroj neniam plu sciis pri li. En la jaro 1348-a la patro testamentis: li dotis sian edzinon per parto de la heredaĵo. La restantan li transdonis al la abatejo de Sant Cugat. Sed la patro ankaŭ promesis doton je dekmil soldoj al la malaperinta filo, se iam li revenus al la hejmo. La patro Saltells mortis; kaj, iom poste, lia filo Berenguer prezentiĝis al la abato kaj postulis por si, laŭpretende, la tutan monsumon havigitan al la monaĥejo, ĉar li ne volis rekoni kiel leĝe ĝusta sian parton. La abato al li respondis dirante, ke nur la komunumo povos verdikti, favore aŭ madfavore de tiu trudo, sed ne la nura persona abata aŭtoritato.

Kiam en la preĝejo, je la kristnaska nokto de la jam citita jaro, estis kantata la matutino, kaj dum la abato tiam estis kantanta la antifonon «Oh magnum mysterium», la filo Saltells alsaltis la ĥorejon akompanate de kelkaj fihomoj; ili kune trafe ekatakis ponarde la abaton Biure, kiu vestite per pontifikaj ornatoj troviĝis sidanta sur la trono —la sama kiu nuntempe estas uzata de la abatino de Valldonzella.

Defendante sin kontraŭ la batoj de la atakantoj, la abato prenis al si la misalon kaj uzis ĝin kiel ŝildon. Sed Saltells, kaj lia kliko, povis barakte ree ponardbati sian viktimon, kiu ankoraŭ kapablis paŝi ĝis la altarperono, kie li fine stumblis kaj falis senvive.

Laŭ diro de la tradicio, la Krucifikso turnis sin por ne vidi la kruelan scenon de la perfida murdo. La popola dirado, jam sur tereno de popollegendo, plie rakontis ke la ĉefa sonorilo de la preĝejo plende sonoris, senpere, dum tri horoj; kaj ke tiu sonorado estis klare aŭdebla ĝis Martorell; kaj ke la artromanika koko el bronzo de sur la ventomontrilo, timigite, kokeriadis terurfunebre. Oni plie asertis, ke iu frato de la murdito, benediktano kiu tiam troviĝis en Romo, perfekte aŭdis kaj rekonis la kokblekon, kaj ke li, konstatinte tiun mirindan fakton, maltrankvile al si mem diris: «Mi devas senprokraste iri al Sant Cugat, ĉar, sendube, io malbona okazis al mia frato.»

La murdo de la abato Biure forte kortuŝis parton de la kristana mondo. La papo Klemento la VI-a ekskomunikis la murdintojn, kaj la Aragona reĝo Petro la IV-a ordonis ilian persekutadon kaj kapton.

Berenguer Saltells kaŝiĝis en arbaroj de la pirenea montaro, meze de densejoj kaj sovaĝaj kaj veproplenaj lokoj, por defendi sin kontraŭ persekutado kaj traserĉado. Oni diris ke li ululis kiel sovaĝa besto. Kaj iun tagon oni trovis lin mortinta.

Tiu estas la tragedia historio pri la murdo de la abato Biure, kiu okazis dum kristnaska nokto, kiam oni sin preparis por ĝoje kaj pie celebri la naskiĝon de Kristo. La bronza koko kiu tiam kantis, nun, elstarante super la portalo de la preĝejo, rememorigas tion al ĉiu vizitanto, precipe okaze de la noktomeza meso de Kristnasko.

En la «Dioceza Muzeo» de Barcelona, troviĝas la albo de la abato, en kiu ankoraŭ estas klare videblaj sangaj makuloj kaj la ŝiroj faritaj de la ponardaj batoj. Kaj en la sama muzeo, estas kiel trezoro gardata la riĉega diversa mantelo, kies ŝtofo estas el valorega cipra teksaĵo.

Kompilis kaj esperantigis:
GABRIEL MORA ARANA



BARCELONA

«AŬRORO»

De nun la Esperanto Grupo Aŭroro de Barcelona, estos nomata *Secció d' Esperanto del Foment Martinenc*. Jen ĝia nova adreso:
Str. Provenca, 595 (Clot) - Barcelona-13.

«STELO DE PACO»

En la Esperanto-Grupo «Stelo de Paco» de Barcelono, okazis la 6-an de oktobro, prelego de s-ano Petro Nuez pri la temo: «Eŭropismo».

La preleganto, resume, skize, rakontis la tutan historion de la Eŭropo-ideo, tio estas, de l' Eŭropismo.

Li emfazis, ke «ĝi, neniam estis kolektiva deziro aŭ pensmaniero, sed nur sento de kelkaj izolitaj konsciaj eŭropanoj, verko de avangardaj progresemaj revuloj. Tiu ideo, ne fariĝis tagon post tago, sed naskiĝis spontane, de tempo al tempo, en malsimilaj cirkonstancoj, en malsamaj medioj, en diversaj lokoj kaj epokoj».

Post priskribo de geografia, rasa, lingva kaj politika aspektoj de Eŭropo, la parolanto prezentis al la aŭskultantaro la diversajn etimologiajn fontojn, kiujn oni atribuas rilate la nomon «Eŭropo».

Li diris, ke «la eŭropan spiritan karakteron kreis tri malsamaj civilizacioj: la greka oferante la arton, la kulturon, la filozofion; la romana, disponigante la retorikon, la arkitekturon, la juron; kaj la kristana, disvastigante konceptojn pri universalismo».

Antaŭ la publiko, aperas, kvazaŭ estus multkolora bukedo, la eŭropa historio: Grekujo, la romia imperio, la mezepoko, la franca Revolucio ĝis lastjaraj eventoj.

Dum la prelego, la oratoro citis kelkajn frazojn de elstaraj eŭropo-ideanoj. Li menciis ĉiujn plej gravajn eŭropismo-luktantojn: unuj, «ambiciaj individuoj, vantaj kaj egoismaj, gloramaj, kiuj revas posedi la unuiĝon de Eŭropo en siaj manoj; unueco, ne en la senco de universalismo, sed kiel regno, perforte militakirita, subpremante la liberecon homan, malpermesante la naturan rajton de la homoj» aliaj, «sentemaj, kiuj grandanime amas la homaron, luktas kaj sin oferas al la popolo. Ili havas progresemajn spiritojn. Ili estas profetoj de la homa justeco, antaŭvidantoj de paca kaj harmonia mondo».

La esperantista parolanto akcentis ankaŭ la influon de la Papismo pri la fadena movo de la eŭropa politiko reĝa kaj imperiestra. Rilate al la feŭdismo, li diris: «Tia reĝimo, pli kaj pli fariĝis intensa. La terposedantoj, iom post iom, iĝis la absolutaj mastrosinjoroj, kiuj posedis ne nur la bienojn sed ankaŭ la kamparanojn; la terkulturistoj vivis en sklaveca stato, nehavante la rajton transmigri, sen konsento, el la bieno, kaj je la vendoprezo aŭ hereda transakcio, ili estis transdonitaj kune kun la farmodomo. Alifoje, la piramida sistemo firmiĝas: kiel bazo, estis la vasaloj, poste la feŭdosinjoroj, dependantaj de la reĝoj, super tiuj ĉi, la imperiestro, kaj ĉe la pinto de la piramido, la Papo, kiu estris la mondan monarkion», kaj pri la imperiismo. «En la nacioj regas la absolutismo: interne, la despotismo, ekstere, la imperialismo kun avida posedo de sklavaj kolonioj».

La malkovro de Ameriko; la evoluo de la scienco kaj tekniko; la presarto kaj literaturo, rapidigas la disvastigon de la kulturo, de revoluciaj ideoj, de avangardaj konceptoj. «La franca Revolucio markas, en la homa historio, startan mejloŝtonon... Ili pretendas anstataŭi arbitran sistemon per sistemo bazita sur racio kaj sperto. La universalismo kaj demokratio estas la standardoj de la revolucio... La revolucianoj estas konvinkitaj, ke en la nova reĝimo, la paco estos natura stato. La reĝa despotismo, laŭte kritikata, denove aperas en la nova Respubliko, sed nune, en formo de teroro...»

«Ja, la nuntempaj eŭropistoj, perceptas, ke la milito ne estas necesa por solvi teritoriajn, komercajn aŭ socialajn diskutojn. Pere de la diplomatio kaj kompreno, la homo povas atingi la pravon kaj justecon. Tiajn postulojn universalajn ili proklamas».

S-ro Petro Nuez finis sian disertacion per jenaj vortoj: «La teknika progreso malgrandigis distancojn.» Antaŭ ol komenci la eŭropan unuiĝon, ni devas konstrui mondan pacon; forigi landlimojn; starigi neŭtralan lingvan komprenilon; elradi-

kigi rasajn, religiajn kaj klasajn antaŭjuĝojn; establi la justan distribuon de la produktaĵoj; forpeli monopolojn kaj privilegiojn; malcentralizi ŝtatojn; akceli la internacian komercon sen interveno de registaroj nek artefaritaj baroj; aboli intrigajn politikajn partiojn. Ĉar, ni, la homoj, nur bezonas justecon kaj liberecon. Kaj pere de tiuj du rajtoj, justeco kaj libereco, ni atingos la mondan pacon, la fratecan harmonion».

La ĉeestantoj regalis la preleganton per aproba aplaŭdado.

STELANO

BILBAO

Aun cuando las actividades del Grupo no se interrumpieron durante el verano, al llegar a esta época han sido incrementadas al igual que todos los años con la organización de nuevos Cursos.

El día 21 de octubre empezó un nuevo Curso de Esperanto para principiantes a cargo de don José Luis Bringas. Dicho Curso tiene lugar los lunes, miércoles y viernes de 8 a 9 de la noche en el domicilio social.

Asimismo, como en años anteriores, se da un curso de prácticas que, de 8 a 10 de la noche, dirige todos los martes don Delfín Ronda.

VALENCIA

El Grupo Esperanto de Valencia ha empezado un Curso de Esperanto para principiantes siendo profesor del curso el doctor Rafael Herrero Arroyo.

VALLADOLID

La 15-an de oktobro, en la sidejo de la Grupo «Fido kaj Espero» de Valladolid okazis la solena inaŭguro de la nova kurso pri Esperanto. Je la 8-a vespere en plena salono komenciĝis la inaŭguro. La Sekretariino prezentis al la ĉeestantoj la grupprezidanton S-ro Gil Contreras, kiu sekve parolis. Li komencis emfazante la koincidon de la komenco de la kurso kun la festo de Sankta Tereza, Doktorino de l' Eklezio, kaj rilatis la internan ideon de Esperanto pri paco, amo kaj interkomprepreniĝo kun la mistikaj ideoj de la Sanktulino.

Sekve li menciis la problemon de la malsato kaj parolis pri la «kultura malsato» konkludante ke Esperanto estas taŭga por plenumi la deziron de la homaro pri kulturo.

Poste la Prezidanto parolis pri la facileco de la internacia lingvo komparante ĝin kun diversnaciaj lingvoj. Li finis kuraĝigante ĉiujn por konstanta perfektiĝo en Esperanto.

Fortaj aplaŭdoj sigelis la lastajn vortojn de S-ro Gil Contreras.

Sekve la kursgvidanto, S-ro Luis Hernández, dankinte al la Prezidanto lian lertan paroladon, rememoris la pasintan Universalan Kongreson kaj komparis la tiean lingvan interkompreniĝon kun la Olimpiadoj, kie ne povas okazi vera interkompreniĝo pro manko de internacia lingvo. Li kuaraĝigis ĉiujn, novajn kaj veteranojn, studi bone kaj perfekte Esperanton kaj invitis la ĉeestantojn viziti la eksposicieton kiu estis instalita en apuda ĉambro.

Fine, en Esperanto, la Prezidanto deklaris inaŭgurita la novan kurson.

Kun la aŭskultado de «La Espero» finiĝis tiel solena festeto.

La nova kurso okazos marde kaj ĵaŭde kun la ĉeesto de 22 novaj gelernantoj.

M. R. URUEÑA

ZARAGOZA

FRATECO la Sociedad Esperantista zaragozana ha iniciado, al igual que el curso pasado, un ciclo de charlas o conferencias en Esperanto.

La primera conferencia de este curso, el día 26 de octubre, corrió a cargo de nuestro samideano don José Martínez, quien con su buen decir, nos dio una verdadera lección cuyo tema fue «El tiempo».

El día 23 de noviembre fue don Fernando de Diego quien nos deleitó con una amena charla acerca de «La Kanariaj Insuloj». Si ya antes de oirle todos teníamos deseos de asistir al 29 Congreso Español de Esperanto, que se celebrará en La Laguna (Tenerife), después de la charla el interés ha aumentado ya que aparte del entusiasmo esperantista, lo anima el deseo de conocer esa parte de España.

Los dos oradores fueron muy felicitados y aplaudidos.

En «Frateco» también han empezado dos nuevos cursos, uno que tiene lugar martes, jueves y sábados, a cargo de don José Andrés Aldana, y otro los lunes, miércoles y viernes, a cargo de doña Inés Gastón, ambos cursos son muy concurridos.

2-a Premio Originala Poezio

TRI NUDAĴOJ DE MODIGLIANI

Parfum' nedifinibla de volupto
dresita sub diec' de karn' tepida,
bildigas la realon, sen abrupto,
de roz' oferiĝinta — ĉu memfida?

Perceptas mi transsalton de la amo
al duondormaj sferoj de la vivo,
kie angor' fariĝas fajrreklamo
de paradiz' dronanta ĉe deklivo.

Ripozo post cindriĝo de la spasmo;
amara plaĉ' de mondo sen espero.
Translim' de nokto kaj entuziasmo
estas aŭror' el nia belvedero.

Venus' pro pekoj. Flosas la indulgo.
L' ekstazo trista estas nur anhelo
de lum' fuĝinta el la ŝlim' kaj fulgo
de la palaco via — de l' bordelo.

Vi estas, senkonscie, monda centro
de graco miksiĝinta kun misero.
Ĝarden' de senfruktec', sur via ventro,
floradas post diboĉ' de l' kruda vero.

Kaj ni rikoltas revon pro soifo;
sukcenon, larmojn de malofta salo...
Vi estas ebenaĵo verda, klifo,
abism' senfunda — perlo kaj migdalo.

Oldajn sekretojn de l' eden' vi kirlas,
el perlamoto de virina koro.
Inter herbar', aŭ silk', ankoraŭ lirlas
la tumultema sango de l' amoro.

Feino de fascin'; kaj ĉielarko;
reĝino de la nokt' kaj de l' absurdo;
visceroj de neestingiĝinta sparko.
Je malproksim' muzikas stranga gurdo

Vi, rekreita en malsana menso
pro la sufer' ŝirita de l' inspiro,
senprude nuda — vazo el fajenco —,
solece, en kuŝej' de pekakiro;


vi, sun' flagranta en profunda ŝakto
de malplenec' spirita kaj ekzilo
de virinec' tretita sen barakto.
Ho via bon' sub gruza maltrankvilo!

Vi, nuda kiel la komenc' kaj fino,
denove virga, sekretega nodo
— kun naŭzo sepultita en la sino —,
indiferenta sur la eŝafodo;

vi, senvualigita ĝis la animo,
vokas la gloron de la senplezuro,
kaj sur altar' vi estas la viktimo
kun forgesitaj pekoj — kota spuro.

Gabriel MORA Y ARANA

Originala Poezio (Laŭda mencio)



PRI GABRIEL MORA I ARANA

Malofte aperas en herbejoj bela floro. Tia estas S-ro Gabriel Mora i Arana, kiun mi ne volus ofendi en lia modesteco. Li estas manlaboristo plenumanta ĉiutage metilaborojn dum multe da horoj; sed en lia kapo ardas la Poezio kaj la Literaturo, kiujn li konstante eksterigas... kaj jen, unu post alia venas al li la premiaj laŭroj, multaj laŭroj, pro liaj verkoj, jen en la propra lingvo, la kataluna, jen en la internacia.

Mi volus portreti lin en ses versoj (Kun lia pardono).

Sen diplomoj nek titolo,
armite nur per forta volo
li leviĝis kaj nun trilas;
spronas lin tre granda koro
kaj li, herbeja, bela floro
poezie, alte brilas.

SALVADOR GUMÁ

ESPERKANTO

Printempa sun' (odoras lonicero!)
tra l' prismo de l' aŭror', sur la vizaĝon
disverŝas vivon — lumon de l' espero.
Ĝojplena knab'! Akceptu versomaĝon.
(De nova verd' kovriĝas ĉiu monto,
kiel ĝermanta gloro de l' estonto.)

Agordas noble plej serenan kanton
de l' oraj revoj, vi, Rideto-Stelo!
Vidigas sorĉoplenan helianton
kaj bluajn tagojn, vi, Rideto-Helo!
(El viv' al vivo etendiĝas ponto,
kiel ĝermanta gloro de l' estonto.)

Amika sintenado kun etoso
de monda harmonio. Jen la graco
de homburĝon' kaj posta ŝvit' — ho roso!
Por vi la mond' fariĝu am' kaj paco.
(La neĝ' postvivas flue en la fonto
kiel ĝermanta gloro de l' estonto.)

Vi kantas kun susuro spontanea:
ĝiskora elmontriĝo de homeco
maturiĝanta ne per sorĉo fea,
sed per la vivplezur' de sang' kaj deco.
(Gajec' infana: poezirakonto
kiel ĝermanta gloro de l' estonto.)

Eniras vi en mondon de kialoj,
kaj ravas vin insektoj, floroj, steloj:
paradas la nuancoj kaj detaloj,
kun birdoj, papilioj kaj fabeloj.
(Somero tronas ĉe la horizonto,
kiel ĝermanta gloro de l' estonto.)

Ho bluaj tagoj plenaj je rebriloj!
(Ho nia cindro-pasintec' amata!)
En la mirland' de revoj kaj ludiloj,
ĝu' kaj feliĉ' avidas je am' frata.
(Impetas vi, el naivec' kaj honto,
kiel ĝermanta gloro de l' estonto.)

Sublima ideal'. Junegaj regnoj
de fantazio sensekreta! Knabo!
Parolas vi per ludoj kaj desegnoj.
De bela akord', vi estas ĝusta klavo.
(Vi staras super ĉiu mirrakonto,
kiel ĝermanta gloro de l' estonto.)

Florad' de simpati' kaj iluzioj;
invit' al amikeco plej natura.
Ne prenas vin, ankoraŭ, elegioj:
nur fantazi' de lumo bonaŭgura.
(Amiko — esperkanto! Ho renkonto
kun la promesoj virgaj de l' estonto.)

....

Sed, kiom da infanoj en sufero! :
senhejma, malsatantaj; pro milit'
mortintaj, kriplaj, orfaj. Dorna vero,
kaj, en ĉi kanto, kvazaŭ glava split'.
Iliaj larmoj estas, ve, rivero
en nokto frostokora sen karit'!

GABRIEL MORA I ARANA

EL LA KVINDEK TRIA UNIVERSALA KONGRESO

"Se ne ekzistus SED kaj TAMEN
ni al ĉio dirus Amen."
(Zamenhofa proverbaro)

En la unua ĝenerala kunveno de U.E.A. (Lundo, la 5-a Aŭgusto 1968-a) nur unu voĉo leviĝis kontraŭ la hispana lingva diskriminacio. Tiu voĉo apartenis al kataluna estonta sacerdoto.

Mi ne estas kataluno; malgraŭ tio mi plezure kontaktas kun la parolantoj tian esprimoriĉan, belsonan kaj klaran lingvon. Ĝian ampleksan literaturtrezoron iomete mi konas; kaj pro tio mi, aragonano, povas aserti ke kaj proze kaj poezie tia trezoro ne envias nian kastiljan ĉiuspecan literaturan verkaron.

SED... ankaŭ mi iomete konas la latinan kaj la malnovan grekan literaturojn, malgraŭ ilia tutplena malapero kiel vivantaj lingvoj. Do ne timu, katalunoj: Eble pro neeviteblaj politikaj, ekonomiaj aŭ eĉ kulturaj premoj via belega lingvo (tute egale kiel nia nemalŝatinda kastilja) iam pereos; sed la grandaj kreitaĵoj de viaj poetoj kaj prozistoj, same kiel tiuj de niaj kastiljaj verkistoj, nemorteble daŭros vivantaj kaj elstare montros por ĉiam la kreofortojn de niaj noblaj regionoj.

La pastriĝonta parolanto ankaŭ multe bedaŭris pro tio ke katalunaj infanoj uzas tute ne-katalunajn vortojn aŭ dirturnojn. Tio ne gravas: ankaŭ ni kastiljparolantoj, per televido inglutis tiujn «ocsiso», «por favor», «de inmediato»...

La lingvoj iom post iom ŝanĝiĝas: Eĉ nia nuna Esperanto eble post sia tutmonda disvastiĝo, tute ŝanĝiĝos; eĉ eble post jarcentoj kaj per tute alia internacia lingvo, oni laŭdos la geniajn kreitaĵojn de la tutmonda estinta Esperanto...

TAMEN... ni fosu nian sulkon.

E. MAYNAR



KOMENTOJ PRI LA KONGRESO

Kiam en septembro 1965-a, la Direkta Komitato de la Federacio vidis la eblecon organizi en Hispanujo Universalan Kongreson de Esperanto, ĝi faris la necesajn demarŝojn por ke tiu ĝenerala deziro efektiviĝu, kaj por ke la kongresa sukceso respondu la planitan celon.

En la unua momento ni konsideris ke la urbo plej adekvata por ĝia okazigo ne estas Zaragoza, kiel oni sugestis al ni el alia urbo, sed Madrid, kie la kongreso povus atingi maksimuman eĥon kaj sekve, la plej grandan propagandan efekton por la diskonigo kaj vastigo de Esperanto en nia patrujo.

Madrid, ne nur estas la oficiala kaj kultura centro de Hispanujo, sed pro siaj monumentoj, muzeoj, parkoj, ktp. ĝi estas nacia kaj internacia celo, kio pliinteresigas ĝin al niaj vizitantoj.

Gvidate de tiu penso, jam tiam ni entreprenis la organizadon, kaj ni konstatis poste, pro la atingita sukceso, ke nia unua intenco estis la plej bona kaj la plej facile efektivigebla.

Ĉiu diskoniga rimedo: Gazetaro, Radio, Televido; la oficialaj kaj privataj informejoj: ministrejoj, turismaj kaj akceptaj organizaĵoj; hotelistaj kaj similaj korporacioj kaj ankaŭ la privatuloj helpis faciligi la kongreslaboron.

Dum la tuta jaro, la Radio kaj Televido, sed precipe la Gazetaro publikigis ne nur ĉiun novaĵon, kiun ni sendis al ili, sed ankaŭ plurajn intervjuojn petitajn de diversaj redaktoroj el Madrid kaj el hispanaj provincoj. La atingita triumfo eĥis en tuta Hispanujo kaj en multaj landoj, kie nombraj agentejoj ĉiutage informadis. Pri la Madrida gazetaro, ĉiu kongresano povis konstati tion per la kongresaj fotoj kaj sciigoj, iufoje tre vastaj, kiuj ĉiutage aperis.

Kiel ekzemplon pri nia aserto ni citos du konkretajn faktojn el aliaj landoj; el Tunizo, zaragozano, kiu loĝas tie jam multajn jarojn, rakontis al ni per letero, ke li sekvis kun intereso la Kongreson, kaj esprimis sian kontentecon kaj emocion pro la sukceso kiun havis la Zaragoza Ĥoro, kiam ĝi kantis honore al kongresanoj.

La dua ekzemplo venis de hispano loĝanta en Argentino, kiu skribe gratulis nin pro la kongresa sukceso. Li sciiĝis pri ĝi la lastan vintron per la intervjuo al S-ro Angel Figuerola, prezentita en la fako Ventana de España (Fenestro de Hispanujo); la sukceson li mem deduktis el la kongresa resumo, kiun la sekretariino de nia Federacio, F-ino Inés Gastón faris en la freŝdata fako Ventana de España, kiam ŝi estis prezentata kiel Figuro de la Semajno.

Fine, ni povas aserti, ke la plej granda atingo de tiu ĉi kongreso estas —laŭ nia opinio— ke ĝi rememorigis Esperanton al multaj homoj, kiuj preskaŭ forgesis ĝin, kaj precipe, ke aliaj personoj ĝis nun fremdaj al Esperanto, estis altiritaj, interesitaj lerni ĝin.

PETO

Partoprenintoj en la kunveno por foto-film kaj magnetofono-amatoroj, okazinta en Madrid la 6-an de aŭgusto 1968 en la kadro de la 53-a U.K. de Esperanto, bonvolu informi pri la kunveno al Esperanto «(fo - ki - ma)» Kultura kaj Propaganda Instituto (Hungara Sekcio) Budapest. P.O. 119. Poŝtfako 16.

ĈU AL HELSINKI?

H.E.F. planas komunan vojaĝon al la Universala Kongreso en Helsinki 27 julio - 2 aŭgusto 1969, por kio jam kontaktiĝis kun grava entrepreno. Informoj en Sekretariejo de H.E.F.

LA RENKONTIGO ESTIS NEATENDITA!



L. KAFANOVA

La renkontiĝo, vere, estis neatendita! Iu foje, trarigardante la katalogon de la manuskripta fako de la Publika Biblioteko en la nomo de Saltykov-Ŝĉedrin, la redaktorino de la Leningrada radio, Tatiana Kruntjajeva subite trovis la noton: «Iosefo Hajdn, «La neatendita renkontiĝo».

Tatiana Kruntjajeva petis alporti la manuskripton. Oni donis al ŝi luksan paperujon faritan el la flava marokeno, ornamitan per arĝentaj angulvinjetoj kaj seruro. Sur la fermoplato estis enstampita la blazono de aŭstraj dukoj Estergazi. Atenteme malferminte la paperujon, Tatiana ekvidis paperfoliojn, kiuj estis desegnitaj per muzika notsignoj. Sur unu el la paperfolioj estis skribite: La neatendita renkontiĝo» «Opero» Apude kuŝis malgranda libreto presita en la itala lingvo, la teksto de la opero.

Kiel diris Tatiana mem, ŝi eĉ ekkriis kaj tuj invitis en la bibliotekon la profesoron de la Leningrada Konservatorio (muzika altlernejo), E. D. Lebedev. Post kiam li konatiĝis kun la neordinara trovitaĵo, la duboj malaperis: tio ĉi estis la manuskripto de la partituro de la opero de Hajdn «La neatendita renkontiĝo», la manuskripto de la opero, kiun la samtempuloj opiniis esti unu el la plej elstaraj verkoj de la komponisto, sed kiu, dum pli ol centjara periodo, estis konsiderata perdita. En unu el la muzikaj informiloj estas pri ĝi jena informo: «...eble la partituro forbrulis dum incendio aŭ ĝi mistere malaperis.»

Kiel estas konate, de la jaro 1761-a, Hajdn servis ĉe la dukoj Estergazi kaj ili opiniis sin laŭleĝaj posedantoj de ĉiuj liaj manuskriptoj. Laŭ la mendo de sia mastro Nikolao Estergazi, kiu havis la kromnomon «Brilega», Hajdn verkis la operon «La neatendita renkontiĝo». Ĝia unua prezentado okazis en Estergaze en aŭgusto 1775-a jaro, okaze de la plej ĝojiga alveno de lia duka moŝto, ercgercogo Ferdinand kaj ercgercogino Beatrisa D' Aste.

Iom pli poste, kiam la muzikkomponisto forveturis el Estergaze, ĉiuj liaj manuskriptoj restis tie. Ili estis konservitaj tie malzorge kaj multo el la heredaĵo de Hajdn, senrevene pereis.

Sed kiamaniere, tamen, la partituro de la opero «La neatendita renkontiĝo» trafis Leningradon?

Post longa, klopodiga, laboro oni sukcesis evidentigi, ke en la jaro 1856-a en Ruslandon, por la partopreno en la kronado de la caro Aleksandro la Dua, venis ambasadoro de Aŭstra-Hungara monarkio, Paŭlo Etergazi, la nepo de tiu Nikolao la «Brilega», ĉe kiu servis Hajdn. Estinte en Peterburgo li vizitis la Publikan bibliotekon kaj ekraviĝinte pri ĝia manuskripta kolekto, promesis donaci al la biblioteko ion el la valoraĵoj, kiuj estis deponitaj en liaj arkivoj. Li tenis sian vorton, sian promeson kaj post la trapaso de du jaroj li alsendis la manuskripton de la opero de Hajdn. Tamen, pro iaj kaŭzoj, oni ne atentis la partituron kaj ĝi kuŝis netuŝite pli ol cent jarojn...

ELRUSIGIS

PETRO POLIŜĈUK

La artikolo estas publikigita en la tagĵurnalo «Komsomolskaja Pravda» de la 10. VIII. 1968 jaro, numero 13260.

K L A R I G O

En nia antaŭa numero de BOLETIN aperis grava eraro, tial ke estis Pola Esperanto Asocio (ne Pola Radio, kiel erare ni diris), kiu sendis donacon al Hispana Esperanto-Federacio, okaze de la 53-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Madrid.

HISPANAJ ESPERANTISTOJ EN BULGARUJO

Okaze de la 20-a Jubilea Kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto Federacio (I.F.E.F.), malgranda grupo de hispanaj esperantistaj fervojistoj konsistanta el 20 personoj, veturis al Varna pasintan Majon.

Kvankam tre malamplekse, mi intencos montri la plej gravajn okazintaĵojn de nia kongreso kaj la plejan allogaĵon de nia longa vojaĝo.

Mi ekveturis el Barcelono la 6-an de majo, kune kun tri samideanoj, kun pezaj valizoj kaj granda iluzio por koni tiujn ne konatajn landojn Jugoslavio kaj Bulgarujo. Kelkaj samideanoj adiaŭis nin en la stacidomo kaj transdonis al ni donacojn portotajn al iliaj alilandaj konatoj, kiuj ankaŭ partoprenos la kongreson.

Ĝis la franca limo la vojaĝo forpasis rapide kaj sen novaĵoj. La franca doganisto demandis al ni: Kien vi iras? —Ni iras al la urbo Varna, por ĉeesti Fervojistan Esperanto-Kongreson —Ĉu al Bulgarujo? —Jes, sinjoro, al Bulgarujo. —Oh! Bone! Daŭrigu kaj bonan vojaĝon!

Jam estis noktomezo kiam ni envagoniĝis en la franca trajno. En kuŝvagono ni tre bone dormis la tutan nokton ĝis la itala limo (Ventimiglia), kiun ni atingis je la 10-a matene.

Denove ni staras antaŭ la doganistoj kaj same kiel en la franca limo, la magia vorto: «Esperanta Kongreso», estis sufiĉa por malfermi la pordon al Italujo. La doganisto interesiĝas pri nia internacia lingvo kaj ni donacis hispanan broŝuron en esperanta lingvo. La vojaĝo daŭris en bonordo ĝis Milano. Tie ni translokiĝis en alian vagonaron por eniri en la jugoslavan landon.

Estis la dua matene kiam la jugoslava polico vekis nin por kontroli pasportojn la kontrolisto kaj doganisto. Ĉiuj estis tre afablaj kaj ĝentilaj. Ili informis nin ke en la pasinta nokto jam trapasis la limon en la sama direkto, kelkaj italaj kaj francaj gesamideanoj. Post rapida eklerno de la Esperanta Lingvo, ili deziris al ni «bonan vojaĝon», en esperanta lingvo. Inter la lasta itala urbo Trieste kaj la unua jugoslava urbo Sezana, la trajno bezonis du horojn. Fine, la pordo de Jugoslavio malfermiĝis kaj ni daŭris la trajnan vojaĝon al Zagrebo, kie ni devas forlasi la trajnon, ĉar niaj korespondantoj atendas nin. Efektive, je la 6-a matene, kiam la trajno eniras la stacidomon de Zagrebo niaj du jugoslavaj amikoj atendas nin ĉe la perono. Tre ĝoje ili bonvenigas nin kaj pere de du taksioj ni veturas al ilia hejmo. Post tre bongusta kaj abunda matenmanĝo, ni promenis tra la urbo, gvidate de niaj jugoslavaj amikoj, kiuj tre ĝentile montris al ni la plej interesajn vidindaĵojn de Zagrebo, precipe la malnovan kvartalon de la urbo. Je la unua horo matene ni reiris al la stacidomo kaj atendis la alvenon de la «Orient Expres», kiu tre akurate alvenis. Post fortaj ĉirkaŭbrakoj, niaj amikoj adiaŭis nin, ĝis la revido post du semajnoj, kiam ni revenos al Hispanujo. Post nia tre longa promenado tra Zagrebo, niaj korpoj estis tre lacaj; pro tio ni luis kuŝlokon, en la trajno ĝis Beogrado. Je la 9-a horo matene la suno vekis nin. Rigardante tra la fenestro, ni vidis la larĝan riveron Danubo kaj trans la riverego la urbon Beogrado.

Sur la perono de la stacidomo, ni jam vidis kelkajn konatojn el Jugoslavio, kiuj tre amike salutis nin kaj babilis dum la haltado de la trajno. Post unu horo la trajno daŭrigis la vojaĝon rekte kaj rapide al Sofio. La bulgaran limon ni atingis je la 14-a horo. Same kiel en aliaj landoj, ankaŭ en Dimitrovgrado, entrajniĝis la policistoj kaj la doganistoj. La policisto demandis al ni: Kien vi iras? —Al la Fervojista Kongreso de Esperanto, ni respondis; granda surprizo estis por ni, ke la policisto daŭrigis la konversacion parolante en Esperanto. La Internacia Lingvo estis la kaŭzo de rapida kaj simpatia amikeco inter ni (bulgaraj policistoj kaj hispanaj vojaĝantoj). Ni festis tiun konatiĝon tostante per hispana konjako.

Granda kaj gaja surprizo estis por ni, kiam la trajno atingis la stacidomon de Sofio. Tiam, rigardante tra la fenestro, ni ekvidis amasojn da personoj alportantaj verdajn flagetojn, kiuj atendis la alvenantajn eksterlandajn gesamideanojn. Kompreneble, inter ili estis niaj gekorespondantoj el Sofio. Raportistoj

el ĵurnaloj kaj radiostacio el Sofio, demandis kaj serĉis pri la hispanoj. Poste intervjuis nin pri nia longa vojaĝo al Bulgarujo.

La sekvantan matenon ni profitis por viziti iom de la urbo, gvidate de niaj gekorespondantoj. Vespere, ĉe la stacidomo, ni atendis la ceterajn hispanajn samideanojn.

La bulgara fervojo, organizis por la kongresanoj, specialan trajnon de Sofio al Varna, nomata «Esperanto Ekspreso», kiu ekveturis de Sofio je la 22,15 h. atingis Varnan je la 6,30 h. matene. La trajno estis gaje akceptita de L.K.K., kiu rapide disdonis inter la alvenintoj la kongresdokumentojn. La renkontiĝo okazis je la 20-a h. en luksa hotelo «ERMA» kun dancado ĝis noktomezo.

Dimanĉe je la 10-a h. okazis la solena malfermo de la kongreso, kun ĉeesto de aŭtoritatoj de Varna. Post vigla parolado de la urbestro de Varna, de la ĉefdirektoro de Bulgara Fervojo kaj salutvortoj el diversaj landaj delegitoj, la prezidanto de I.F.E.F., oficiale malfermis la kongreson.

Lunde komenciĝis la laborkunsidoj. Vespere okazis folklora teatraĵo kun belegaj kantoj kaj dancoj el diversaj regionoj de Bulgarujo.

Marde okazis la plena kunsido. En ĝi estis elektita la nova estraro de I.F.E.F., laŭ la jena rolo: Prezidanto, Joachim Giessner; Vicprezidanto, Gvozden Sredic; Sekretariino, Elfriede Kruse; Kasisto, Otto Walder kaj Redaktoro, Per Johan Krogstia. Vespere je la 17-a h. okazis la akcepto fare de la konsilantaro de la urbo Varna de ĉiuj partoprenantoj kiujn oni regalis per abunda bankedo akompanata de vigla kaj amuza balo en ĉarma salono de la hotelo «HAVANA». En tiu bankedo ni transdonis de la urbestro de Barcelono al la urbestro de Varna, malgrandan bronzan fonton «Canaletas». Li tre afable esprimis sian dankon al la barcelona urbestro.

Merkrede okazis la tuttaga ekskurso per aŭtobusoj al Neseber. Tie ni vizitis ĝiajn tre antikvajn preĝejojn famkonatajn en la tuta mondo. Dum tiu ekskurso ni ĝuis belegajn pejzaĵojn ĉe la Nigra Maro.

Ĵaŭde matene, oni daŭrigis la laborkunsidojn. Vespere je la 19-a h. okazis futbalmaĉo inter esperantista teamo kaj «Klubo Lokomotiv» el Varna. En la esperantista teamo ludis du hispanaj samideanoj.

Vendrede, lasta kongrestago, okazis aŭtobusekskurso al la urbo Balĉik, situanta apud la Nigra Maro, kun belega palaco enhavanta belajn ĝardenojn, fontanojn, ktp. Posttagmeze ni revenis al la kongresejo por ĉeesti la duan plenan-kunsidon kaj fermon de la kongreso fare de la nova Prezidanto.

Post la kongresfiniĝo, multaj amikaj adiaŭoj okazis inter la kongresanoj.

Ni revenis al Hispanujo tre kontentaj de nia restado kaj kun grandaj kaj belaj rememoroj de tiu neforgesebla vojaĝo al la bela regiono «ORA SABLO», kaj ĉarmaj landoj BULGARUJO kaj JUGOSLAVIO.

RAFAEL DEVÍS

DONATIVOS PARA BOLETIN - 1968 (Continuación)

Suma anterior	4.858,—
M. Tarragó, *Almatret*	30,—
E. Hurtado, *Valencia*	50,—
J. Martínez, *Bitem Tortosa*	50,—
J. Hutesa, *Sabadell*	200,—
J. Ventura, *Tarrasa*	325,—
A. Asensi, *El Palmar*	20,—
J. Marcé, *Vendrell*	50,—
J. Molina, *Barcelona*	60,—
P. Nuez, *Barcelona*	75,—
Klubo Esperanto Payá, *Mislata*	405,—

A. María, 5; Vicentita, 5; Angelines, 5; María Carmen, 5; Ascensión, 5; Isabelín, 5; Josefa, 5; Rosita, 5; Ramonet, 5; Sanchis, 10; Terol, 10; Ruiz, 5; Pascual, 5; Maroto, 5; Mateu, 10; Alcantarilla, 10; Giménez, 5; Torregrosa, 5; Enriquito, 10; Leopoldo, 5; Rafa, 10; Serisola, 10; Pomares, 10; Roque, 10; Vicente, 10; Tonet, 10; Vilaplana, 10; Forés, 10; Forés (elec), 10; Alfredo, 10; Julio, 10; Ceo, 10; Modesto, 25; Roberto, 30; Reig, 10; Críspulo, 10; Doménech, 5; Lozano, 10; Catalá, 5; Blasco, 10; Jacinto, 5; Félix, 10; Santos, 5; Albero, 10; Segarra, 10; Eliseo, 5; Angelet, 10.

F. Mezquida, *Denia*	50,—
M. Monrós, *Artés*	100,—
Anónimo, *Barcelona*	1.000,—
Esperantista, *Valencia*	2.000,—
M. Ruiz Maza, *Madrid*	50,—
R. Canet, *Alicante*	200,—
Anónimo	540,—
A. del Corral, *Argentina*	150,—
R. Lecat, *Bélgica*	50,—
M. Ocaña, *Francia*	100,—
L. H. Izal, *San Pablo de Ordal*	272,—
	10.635,—

Ni legis por vi...

Prelegoj de la 10ª Internacia Seminario de GEJ en la Serio 1 «Esencaj trajtoj de la hodiaŭ mondo», Volumo 1; kontribuaĵoj de Boža Popović, Jugoslavio; Vasil Peevski, Bulgario; Ivo Lapenna, Britujo; Adam Gula, Pollando; Wim de Smet, Belgujo; André Albault, Francujo; Erkki Kääriäinen, Finnlando; Klaus Wandelt, Germanujo kaj Hans StraBl, Germanujo. Kompilinto, Hermann Behrmann. Kun bibliografioj, biografietoj kaj fotoj de la aŭtoroj. Antaŭparolo de Uwe Joachim Moritz. Eldonejo Ludwig Pickel, Nürnberg, 1967. Formato 21 × 13'5 cm. 170 paĝoj, broŝurita, kun ilustraĵoj. Prezo 9'60 GM afranko aŭ egalvaloro.

Tre ofte, oni recenzas beletrajn verkojn, sed, ne natursciencajn librojn. Kial?...

Tial ke, nuntempe, ĉiuj branĉoj de la scienco progresas tiel rapide, mi kuraĝus diri, eĉ pli rapide ol la homoj povas asimili tiun progreson, oni ja ne pravas opinii, ke tio estas ekskluziva apartenaĵo de sciencistoj. La scienco haste pelas autaŭen la civilizon, tio estas, la homaran vivon de la homoj kaj oni ne devas vivi kvazaŭ en alia mondo, for de tiu antaŭeniro. Tio ne volas signifi ke ĉiu fariĝu sciencisto; sed, same kiel la kleraj personoj klopodas esti kiel eble plej perfektaj rilate la spirita evoluo de la homaro, tiel same la nuna scienca evoluo postulas, almenaŭ, supraĵajn konojn pri la modernaj malkovroj de la tekniko, por ne resti tute for de nia civilizo.

La intenco de tiu ĉi verko, disvastigi kaj konservi la faritajn prelegojn, estas tre laŭdinda, ĉar la vortoj forflugas kun la vento; kaj plie, pro tio ke ĝi efektiviĝas esperante. Per sama kvanto da libroj ol en nacia lingvo, la disvastigado estos pli internacia, kiel internaciaj estas la temoj kaj la eminentaj prelegintoj. Pro ĉio tio, la esperantistaro multe ŝuldas al ĉiuj kunlaborintoj kiuj kontribuis al la efektivigado de la seminario kaj ties eldono en nia lingvo. Esperanto bezonas konkeri kaj kulturi ĉiujn aktualajn temojn, ĉiujn aspektojn de la homa vivo, se ĝi volas resti vere vivanta. La esperantistoj devas klopodi, devas helpi por ke tiel okazu.

Kiam mi ricevis la libron «La Mondpercepto de la Modernaj Natursciencoj» por ties recenzo, mi tuj pensis: «Jen osto por rodi»... sed ne. Ĝi estas tiel interesa, tiel klare esprimitaj siaj konceptoj, tiel facila sia legado kaj kompreno, ke mi legis ĝin detale, ne nur senpene, sed ankaŭ ĝue. Ne timu, ĉar ĝi ne entenas plumbajn klarigojn pri nekonataj sciencaj aferoj. Kontraŭe, malgraŭ siaj timigaj nomoj, ĉiu prelego katenas la atenton de la leganto. Krom tio, la volumo estas bonege presita sur bonkvalita papero, en lingvo klara kaj flua.

La enhavo konsistas el la jenaj prelegoj:

Rigardo en la Mikro — kaj Mikrokosmon. Natursciencaj Fundamentoj pri Kosmonaŭtiko kaj Pac-Cela Utiligo de Satelitoj. Internaci-Juraj Problemoj de Spacveturado. Elementaj Korpuskloj kaj la Strukturo de Materio. Nunaj Mondperceptoj per la Biologio. Superpopolado, Konsekvenco de Kronika Malsato. Pri la Postsekvoj de la Glacia Epoko en Fenoskandio. Cibernetiko. Ranger Fotas la Lunon.

Por dece recenzi tiun ĉi libron, estus necese tro longa spaco. Pri tiu ĉi, kiel multfoje okazas, la plej ĝusta, la plej taŭga recenzo estus kopii ties antaŭparolon. Ĉiu antaŭparolo celas klarigi la koncernan temon kaj ĉiu recenzo ekzameni ĝiajn ecojn, bonajn aŭ malbonajn, en mallonga raporto. Tamen, kiam ambaŭ paralelas kiel nun, la prologo, ordinare multe pli longa ol la kritiko, ankaŭ pli bone povas esprimi la kvalitojn de la verko.

Mi tutkore rekomendas tiun ĉi, ne nur pro ĝia pozitiva valoro pri scienca diskonigado, sed ankaŭ, pro tio ke, de la favora akcepto de la nuna libro dependas la aperon de aliaj volumoj pri la prelegoj de postaj seminarioj, kies temoj pritraktos modernajn aspektojn de religio kaj filozofio, sociaj aferoj, artoj, pedagogio kaj tekniko.

J. DEVIS

HON DAT. Romano de Anh Duk. Sud-vjetnama literatura kaj arta Premio Nguĵen Dinh Chieu. 1960-65. Tradukis Ngujen Minh Kinh kunlabore de Ngujen Minh Tung kaj Ngo Quy Toan. Kovrilo de Van Cao. Fremdlingva Eldonejo. Hanojo. 1968. 19 x 13 cm. 447 paĝoj.

Laŭ la antaŭparolo de Tran Bach Dang, Prezidanto de la Konsilantaro de Verkistoj kaj Artistoj de Sud-Vjetnamio, tiu ĉi romano estas vivovera rakonto okazinta en la vilaĝeto Hon Dat, ĉirkaŭ la jaro 1961. Tie, pli ol mil soldatoj, ekipitaj per plej bonaj armiloj eĉ kun helpo de militŝipoj, devis rezigni sian batalon, post dektaga kolizio kontraŭ 19 gerilanoj, inter kiuj troviĝis du knaboj, deksepjara kaj dektrijara, tri virinoj kaj sepjara infanino.

Post la unua renkonto, kiam, interne de individuaj truoj en la tero, la gerilanoj surprize atakis la soldatojn sur la senŝirma kampo meze de rizejoj plagitaj de kamuflitaj foskaptiloj kien la soldatoj multnombre glitfalis, ili devis forkuri kaj rifuĝi en kaverno, de kie, dum la dektaga sieĝo, preskaŭ sen akvo kaj sen rizo, la gerilanoj kuraĝe defendis sin mortigante pli ol 100 soldatojn de la Vjetnama Respublika Armeo krom usonan konsilanton.

La tuta romano celas glorigi la fanatikan batalvolon de homoj serĉantaj la reunuiĝon de sia patrujo kaj la propran vojon al feliĉo, sen interveno de fremdaj potencoj devigantaj perforte la realigon de io, kio ofendas la sendependan spiriton de tiu suferanta popolo de herooj profitante samtempe la okazon por politike propagandi.

Samkiel «Kun la defendantoj de Kon Ko», el la sama eldonejo, la romanano, en flua lingvo, klare kaj senerare, laŭ stilo, foje estas korektebla la uzado de la prezenco anstataŭ la preterito en verbaj tempoj, eble influataj pro nacia esprimmaniero.

J. DEVIS

Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto N.° 9. Aktoj de la Akademio 1963-1967, 75 paĝoj. Desponejoj: U.E.A. Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2. S.A.T. Avenue Gambetta 67, París-20.

Varme mi rekomendas la studon de tiu-ĉi Oficiala Bulteno, kiun mi konsideras tre grava pro la enhavo: Mallonga historio de la Lingvaj Institucioj, Statuto de la Akademio de Esperanto, Enketoj kaj Decidoj pri la Pasivaj Participoj kaj Vortfarado, Komunikaĵoj al la gazetaro.

Ĉiu esperantisto, kiu konscias, ke sen absoluta lingva unueco nia movado povas krevi kiel sapveziko, legos kun intereso kaj profito tiun-ĉi 9an Bultenon, kiu min surprizis per sia klareco: klara preso, klara lingvo, pli klara argumentado!

La leganto povos multon lerni, ne nur pri Vortfarado, pri signifo de Pasivaj Participoj, pri la fazoj de Akademiaj Decidoj, sed ankaŭ pri ... manovroj maledifaj kaj subplankaj.

Fuŝan servon faras al Esperanto tiuj esperantistoj (eĉ se akademianoj) kiuj ne opinias kun Zamenhof, ke «Lingvo plenumas sian difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin severe egale»; kaj ke «ni devas konservi tiun severan unuecon, kiu por lingvo estas multe pli necesa ol ĉiu ŝagjna aŭ eĉ vera perfekteco». Por kio do taŭgus tiu murmurata kompromiso pri la participoj? Ĉu ni devas instrui, ke ilia signifo estas malpreciza, dusenca aŭ dubsenca ĉar miksita kun kompromiso, iel, kvazaŭ kafo kun lakto? Al tio Profesoro Waringhien, kiel Prezidanto, grave kaj prave respondis: «Tion mi ne faros, ĉar la utilecon de tia «kompromiso» mi absolute ne vidas» (pĝ. 14).

Efektive, Zamenhof ne povas cedi eĉ unu milimetron ĉar li jam mortis! Kaj lia verkaro ne povas reflui malantaŭen ĝis la deirpunkto por realflui kun participŝanĝoj, kiujn ankaŭ mia logiko forpuŝas. La Akademio decidis, ni do havas normon por aplikado de la Participoj; nun ni lojale sekvu kaj kune sarku la rolon el la ora tritiko de nia kara lingvo.

Salvador GUMA

LA EKUMENA LINGVO

Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), kiu kunligas la protestantojn el la diversaj Eklezioj kaj Kredkonfesoj eldonis tiun interesan informan folion seplingvan.

Oni detalas en la broŝuro la avantaĝon de Esperanto en internaciaj rilatoj, speciale en religiaj kongresoj kaj kunvenoj.

«Adorante la saman ĉielan Patron —konstatas la broŝuro— kaj parolante la saman neŭtralan lingvon, ili vere sentas sin *unu en Kristo Jesuo.*»

La broŝuro estas bona propagandilo de esperanto en tiuj protestantaj medioj, kiuj ne konas tiun lingvon, ĉar la

informoj estas en angla, franca, germana, hispana, nederlada, sveda kaj esperanta lingvo.

Prezo po ekzemplero afrankita 0,15 gld aŭ egala valoro.

F. DE LA PUENTE

SERENADO DE DON-KIĤOTO
(*El Muziko por Radio-spektaklo*)
Muziko D. Kabalevski, versoj de S. Bogomasov. Moskvo 1968.

Ĝi estas simpla verketo kun belsona melodio kiun la aŭtoro komponis sub la inspiro de la fama kavaliro; la baso de la akompano eble reflektas kion al la aŭtoro inspiris la figuro de Don Kiĥoto ĝi estas kuraĝa en kontrasto kun la agrabla kaj eĉ gaja melodio, kio permesas memori ĝin facile.

KROMERIZ. — Turisma broŝuro faldformata kaj belaspekta. Ĝi estas eldonita de Distrikta komisiono por turismo en Kromeriz, C.S.R.

VICHY. — Plurkolora faldformata turisma broŝuro, eldonita de Office de Tourisme et Thermalisme, Vichy.

ĈU VI PAROLAS ESPERANTON? — Afiŝetojn kun tiu simpla sed taŭga slogano ni ricevis en franca kaj en angla lingvoj.

MEDITERANEA FOIRO. — Afiŝo pri tiu Specimena Internacia Foiro, Palermo.

FESTIVALO DE SZEGED. — Faldformata programo kun fotoj.

POŜTKARTO. — Okaze de la Internacia Turista Kongreso en Szeged estis eldonita poŝtkarto kun alegorio kaj teksto en Esperanto.

LA 10-a INTERNACIA FOIRO EN BRNO. — Informa broŝuro belaspekta kaj ja interesa. La Foiro okazis de la 8-a ĝis la 17-a septembro en BRNO. C.S.R.

ANTAŬEN SUB LA GLORA STANDARDO de la OKTOBRA REVOLUCIO. 62-paĝa libreto broŝurita. Eldonis Framdlingva Eldonejo, Hanojo 1968.

KWASAROJ... ĉu estiĝantaj sunsistemoj?, fare de Manuel Halvelik, aŭgusto 1968. Vastigo de flanktemo el Gravito kaj Tempo, 1967, provizora eldono. Eldonejo Sonorilo. Prezo 8 int. rkp. aŭ 15 steloj.

KEMIO INTERNACIA. — N.° 1, volumo 4, Eldono de Urugvaja Esperanto-Societo. Prezo de la ekzemplero 0,75 U. Dolaro. Jarabono 2 U. Dolaroj aŭ egala valoro.

LETERO EL ĈEĤOSLOVAKIO. — Multobligitaj kopioj de presita Letero el ĉeĥoslovakio al amikoj-esperantistoj dissendita la 28-an de aŭgusto de Sileziaj esperantisto, estas haveblaj kontraŭ afranko.

KULTURAJ KAJEROJ. — Eldonas Esperantista Kulturdomo «Gresillon». Prov-numero kontraŭ respond-kupono al S-ro P. Babin, prezidanto de la E.K.D. 13, Bd. de la Chauviniere, 44, NANTES, Francujo.

KASTELO GRESILLON. — Informaj presaĵoj pri la Esperantista Kulturdomo ja interesaj kun mapo kio faciligas koni la situon.

LA GERMANA POPOLO KAJ LA UNUIĜINTAJ NACIOJ. — Broŝuro per kiu la Germana Demokratia Respubliko informas pri la principoj de la ekstera politiko per dokumentoj, kiuj eksterlande estas malpli konataj. Sendita de Centra Laborrondo de la Esperanto-amikoj de la G.D.R. en la Germana Kulturligo.

MARTA. — Editions Françaises d' Esperanto, eldonis tiun faman romanon de la pola verkistino Elisa Orszesko, en traduko de D-ro. ZAMENHOF. 1968. Formato 13,5 × 20,5 cm., 213 paĝoj, bindita.
Prezo 43 steloj aú egalvaloro (215 ptoj.).

POŜTKARTO. — Bruno Gahler, GLINDE-Hamburg, eldonis poŝtkartojn okaze de la Jaro de la HOMAJ RAJTOJ, dulingve — Germane kaj esperante —. Ĝi estas la 3.ª Memor-Eldono. Prezo ne indikita.

DEKDUJARAJ Interveno k. Agreso de la Usonaj Imperiistoj en LAOSO. — Eldonis NEO LAO HAKSAT. — Eldonejo. Formato 12 × 18 cm. 137 paĝoj, broŝurita.

MUZEO LAZARO GALDIANO



La muzeon Lázaro oni aranĝis je universala priokupo pri ĉiuj artoj kaj teknikoj, en ĝi reprezentataj per elstaraj ekzempleroj. La tutaĵo, vere eksterordinara, de la artaj pecoj kiuj ĝin formas, apartenis al S-ro José Lázaro Galdiano kiu donis ĝin al Hispanio en 1947-a okaze de sia morto.

Post kiam oni kreis la fondaĵon kiu havas lian nomon kaj oni finpretigis la installaborojn en la iama loĝejo de la donanto, oni inaŭguris la Muzeon la dudek sepan de Januaro de mil naŭcent kvindek unua. De tiam ĝia famo larĝe disvastiĝis; kaj ĝiaj ennaĵoj, kiujn antaŭe apenaŭ oni konis, estas hodiaŭ konsiderataj nepreterlasendaj por studi multajn aspektojn de la Arthistorio.

Nune oni proponas al la publiko tridek sep salonojn en kvar etaĝoj.

Estas vere eksterordinara la riĉeco kaj varieco de la ekspoziitaj pecoj, tiel ke estas malfacile ilin mencii eĉ rapidegmaniere. Elstaras la emajloj per valoregaj ekzempleroj ek de tiuj bizancaj alveoligitaj sur oro de la deka jarcento ĝis la «grisallas» de Limoges de la deksesa. La eburaĵoj, inter kiuj elstaras la arabaj kaj bizancaj kofroj, borgona Madono de la dek dua, alia francgotika de la dekkvara krom la diptikoj de la Pariza skolo kaj mezepokaj altaroj de la itala eburarto. La juveloj, per multaspekta kaj brila atesto de verkoj helenaj, romanaj, arabaj, gotikaj, renesancaj —delikataj kreaĵoj de Benvenuto Cellini— barokaj kaj romantikaj. Tre grava pro la diverseco da tipoj estas la bronzokolekto el pasinteco, de la Mezepoko kaj, je granda abundo, italaj el la renezanco. Same multnombraj kaj altkvalitaj specimenoj de la religia ĉiustila orarto.

Oni ekspozicias multvalorajn pecojn el ceramiko, italajn kaj hispanajn el diversaj epokoj. En la supra etaĝo oni aparte instalis la grandajn kolektojn da tolaĵoj hispanaj, da arabaj armiloj —kun riĉega specimeno de spadoj presidataj de la glavo donacita de Inocenco la Oka al Grafo de Tendilla— pudropotoj, ventumiloj kaj medaloj laŭ aparta ekspozicio de ĉiu ekzemplero. Ĉio ĉi formas plej gravan kaj plenplenan paradon de pompartoj kiun oni povas rigardadi en Hispanujo.

Aparte valora estas la kolekto da pentraĵoj kiu ampleksas mirindajn verkojn de la grandaj majstroj de la tutmonda arto. Pro la neebleco citi pli amplekse, ni ne povas ne citi en la hispana pentroarto grandegan kolekton de la kvarcentjaraj skoloj kaj la nomojn Sánchez Coello, El Greco, Velázquez, Ribera Zurbarán, Claudio Coello, Valdés Leal, Antolínez, Cerezo, Murillo, Paret, Goya, Alenza, Lucas, Vicente López, Los Madrao. El la eksterlandaj skoloj ni rimarkigu, el la flandra, Van Eyck, Isenbrandt, Memling, Gerad David, Qintin Metsys, Van Orley, Teniers, Van Dyck... el la nederlanda, Bosco, Moro, Rembrandt, Hobbema, Cuyp... el la itala, Leonardo de Vinci, Magnasco, Guardi, Tiépolo. Tre grandnombra estas la angla pentraĵofako, per verkoj de Gainsborough, Reynolds, Lawrence, Constable k.t.p.

Tia estas, laŭ nedetalaj trajtoj, indekso nepre reduktita de la enhavo de ĉi tiuj salonoj kies aranĝo pro ĝia granda moderneco kaj beleco kreis skolon en la muzea mondo.

FOLKLORA PREZENTADO

Du el la dancoj de la Folklora prezentado okazinta post la vespermanĝo omaĝe al nia Prezidanto la 9-an de aŭgusto dun la okazigo de la 53 ª Universala Kongreso de Esperanto en Madrid.

DIVERSAĴOJ

LUNG FUNG TRADING COMPANY. G.P.O. Box 15747, Hong Kong, kies direktoro estas malnova esperantisto, ofertas sian servon al ĉiulandaj esperantistoj kaj serĉas kunlaborantojn por organizi internacian komercan servon. Ĉiam servas al vi, se vi volas aĉeti ion ajn el Hong Kong. Ĉiam servas al vi, se vi volas vojaĝi al Hong Kong. Tre bona servo! Tre favora prezo! Bonvolu enketi kaj proponi!

Ĉio ĉi estas kio ili diras kaj mi aldonas: Bona okazo por montri la taŭgecon de Esperanto por praktikaj celoj.

SUKCESO POR ESPERANTO

Okazis unuan fojon en aŭstria historio, ke la sekretario de IEMW Herbert März scienca bibliotekisto faris sian «ekzamenon por bibliotekscienco» en esperanta lingvo. H. März fondis en 1948 aŭstrian E. junularon, estis redaktoro de la gazeto «La Distro» kasisto kaj librotenisto de feria semajnoj 1963 en Wien, 1966-Klosterneuburg kaj Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965 en Wien, kunfondinto de la nun plej granda esperanto organizo en Aŭstrio, Aŭstria Esperanto-Movado kies estrarano li estas.

Gratulon al nia samideano S-ro H. März.

ESPERANTO LUDIS GRAVAN ROLON EN NEESPERANTISTA GERMANA-FRANCA RENKONTIĜO

La Internacia Federacio de la Popolaj Universitatoj organizis de la 25-a ĝis la 27-a de oktobro 1968 Kulturan Renkontiĝon inter francaj kaj germanaj membroj de P.U. en Gross-Gerau (apud Majenco).

S-ro René Llech-Walter, kiu havis la ŝarĝon organizi la Nacian Kongreson de la Popolaj Universitatoj en Perpignan dum septembro 1968, estis invitita de S-ro Pierre Petit, la franca respondeculo de tiu manifestacio.

Oficiala akcepto okazis ĉe la Subprefektejo de Gross-Gerau kaj la Subprefekto, S-ro Alfred Schmidt, salutis germane la ĉeestantaron.

Interpretistino tradukis france sed tiel malbone ke la Subprefekto daŭrigis en esperanto, kaj S-ro René Llech-Walter tradukis france.

Poste, en ĉiuj okazoj, la Subprefekto parolis esperante kaj, ĉu S-ro Petit, ĉu S-ro Llech-Walter, tradukis france.

Kelkaj gazetistoj, kiuj ne ankoraŭ aŭdis esperanton, miris kaj raportis favore pri tiu ilo de interkompreniĝo kiu bone helpas kiam la interpretistoj ne estas famaj!

PORSCIENCA-FILOZOFIA ALPROKSIMIGO

Dum unu el la lastaj kunsidoj de Porscienca-Filozofia Alproksimigo okazintaj en Zaragoza, sinjoro Mairal prezentis raporton pri manko en hispana lingvo de neduba inkluzivo de ambaŭ seksoj en pluralaj aludoj (niños y niñas); pri ofta neebleco esprimi hispanlingve per unu sola radiko du kontraŭajn ideojn (grande, pequeño); kaj pri la nereguleco en la sama lingvo por la akiro de la inaj nomoj (caballo, yegua).

S-ro Maynar, dum la diskutado atentigis pri la fakto ke en Esperanto la afero estas tute klare kaj fikse solvita respektive per la prefiksoj *ge* kaj *mal* kaj la sufikso *in*.

TIP C BOLOIX.-REINA FABIOLA, 7 -ZARAGOZA

D. L. Z - 375 63